

# Bona Espero



## Cirkulero 71

por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.

Marto 2010

prezidanto: Bernd Schönberner ★ Am Krähenberg 30 ★ D-59872 Meschede

☎ +49-(0) 291-82552 ★ ✉ schoenberner.bernd@t-online.de

*Karaj amikoj kaj subtenantoj,  
Ursula sendis al mi leteron kun interesaj  
novaĵoj pri Bona Espero:*

“Estimataj karaj subtenantoj de Bona Espero!

Akceptu niajn plej korajn kaj dankemajn salutojn pro via subteno en la jaro 2009. La jaro pasis en nia institucio plena je laboro kaj taskoj, solvendaj problemoj kaj malfacilaj momentoj, sed finfine ĉio ordiĝis laŭeble. Prioritate estas la sano de la al ni fidataj infanoj, la nutrado kaj higieno, la lernado kaj emocia ekvilibro. Feliĉe per la helpo de ĉiuj plenkreskuloj ni sukcese atingis ĉion tion kaj nun, en la somera ferio de januaro, ĉiuj plenkreskuloj iom ripozas.



En 2009 lernis ĉe ni entute 37 gelernantoj, el kiuj 24 finis la regulajn studperiodojn kaj pasos al la venonta klaso. La aliaj 13 forlasis nin meze de la jaro, povis reiri al la familioj kaj daŭrigis en aliaj lernejoj. Okazas ĉiam pli ofte, ke infanoj bezonas nur kelkajn monatojn da foriro de la familio, ĝis kiam iu parenco adoptas ilin. La nova tutmonda politiko por socie marĝenitaj infanoj estas, ”ne plu loĝigi

ilin en institutoj kaj orfejoj en grandaj kvantoj, sed en anstataŭaj familioj”. Ankaŭ ni kun la tempo adaptiĝas al tio. Se ni havus pli da geedzaj paroj por zorgi 24 horojn tage grupojn da dek infanoj, ni povus akcepti pli da infanoj, sed la esperantistoj ne tendencas al tia vivmaniero.

### donacokonto:

konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede  
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

### kasistino:

Dagmar Rahn ✉ Hirschfeldstr. 3 ✉ D-59581 Warstein  
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328  
✉ dagmar@rahn76.de

Pro neantaŭviditaj financaj kunlaboroj ni sukcesis realigi longjaran revon: protekti la altvaloran esperanto librojn de nia Instituto sub vitraj pordoj en belaj ŝrankoj. Dum la seka sezono la libroj en simpla bretaro iĝis iom rozkoloraj pro la savana ruĝa tero! Ĉiu el la dek ŝrankoj havas sian patronon: Astrid Birkbak, Erik Mortensen, Bruno Dantas, Catrin Bossong, Gaby Treanton kaj “les amis de Bona Espero”, Daniela Grassini, Giovanna Pinori, Helene Dubois, Ari Lima Haime. Ĉiu ŝranko entenas 3,60 m da libroj kaj kostis 160 eŭroj. Admirantaj, niaj oftaj vizitantoj eniras la bibliotekon de esperanto, bonega okazo informi ilin pri la Internacia Lingvo.



Tie ankaŭ okazas la esperanto kursoj por infanoj kaj kelkfoje por volontuloj ne-esperantistaj, kiel ĉijare Alessandra Corradini el Italio, kiu komencis flue formi frazojn post du semajna lernado, aŭ la germana verkistino el Leipzig, Constanze John, kiu verkis historiojn kiujn ŝi lerte kapablis eltiri el la eĉ malgrandaj infanoj.

La tri bonegaj esperanto-parolantoj Georgo Handzlik, Marian Dobrzynski kaj Jerzey Dobrzynski ne lernis sed dum longaj horoj konversaciis en nia bela biblioteko kun la bonesperanoj. La francaj volontuloj komence de la jaro ankoraŭ ne havis la ŝancon vidi la ŝrankojn, sed kiam ili venos venontfoje, ja povos ĝui ĝin.

Bonan antaŭenpuŝon en la lernado de Esperanto de niaj novaj malgrandaj infanoj donis en marto/aprilo sinjorino Gaby Treanton. Kiel sperta instruistino, malgraŭ siaj 88 jaroj, ŝi entuziasmigis la infanojn ĉiutage kaj planas reveni por daŭrigi. Ŝi kaj Helene lecionis en la granda manĝosalono, ĉar la klasoĉambro estis ne sufiĉe granda. Sed ekde februaro funkcias plia belega nova klasoĉambro!



Certe interesas vin la sukcesa biografio de tiuj eksaj lernantoj, kies unuajn lernojarojn en Bona Espero vi, karaj amikoj, financis, kaj mi povas honeste diri al vi, ke valoris la investon ...

**donacokonto:**  
konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede  
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

**kasistino:**  
Dagmar Rahn ☐ Hirschfeldstr. 3 ☐ D-59581 Warstein  
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328  
✉ dagmar@rahn76.de

Surstrate en Cavalcante ni renkontis plurajn eksajn lernantojn de Bona Espero kaj ĉiam estis granda gajeco vidi Maria Fátima estri la nuran benzinvendejon de la urbo, revidi Everton kaj Clementino, Jaqueline kaj Michely.



Alis Ferreira Torres estas frato de Tania, Alessan, Amanda, Celio, kies patro frue mortis kaj la patrino vivis en fora bieno sen povi eduki la infanojn. Li restis kun ĉiuj aliaj gefratoj jarojn kun ni, poste estis akceptita de avino en Brasília, kie li daŭrigis la edukadon. Li studis en universitato, estas ŝtata oficisto kaj elektiĝis antaŭ kelkaj monatoj en Brasília-Planaltina kiel konsilisto por infanprotekado.



Antonio Miguel Cordeiro kaj liaj du fratoj Jose Carlos kaj Erasmo vivis kun ni ekde nia alveno 1974 ĝis 1981, kiam ili iris vivi kun la patrino en Brasília. Antonio Miguel revis iĝi policisto, li studis por tiu profesio kaj realigis sian revon. Li laboris en Alto Paraiso kaj apudaj urbetoj. Edziĝis, havas 4 gefilojn, konstruis la plej modernan kaj belan domon en la urbeto Teresina, kiun li forluas al la poŝtoŝeĵo kaj en kies dua etaĝo li loĝas. Kiel konata policisto li prezentiĝis kandidato al urba konsilanto kaj estis elektita komence de 2009. Sur la foto li ricevas la gratulojn de Ursula kaj Giuseppe.

Tania Ferreira Torres komencis vivi kun ni en 1990, sesjaraĝa, kaj restis en Bona Espero ĝis 1999, kiam ŝi iris denove vivi kun la patrino kaj lerni en mezgrada lernejo. Poste pro propra iniciato ŝi batalis por eniri universitaton por studi zooteknikon, bestbredadon kaj -nutradon. Pasintjare ŝi diplomiĝis, tuj akiris bonan postenon ĉe la ŝtata departemento pro agrikulturo kiel reprezentanto en la urbo Cavalcante kie ŝi naskiĝis. Tie ŝi havas ne nur oficejon, sed sekretariinon kaj ŝoforon kaj konsilas la bienistojn pri bestbredado, ĉar en tiu regiono la nura komerco estas bredado de bovoj.



**donacokonto:**  
**konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede**  
**(BLZ / bankkodo 464 510 12)**

**kasistino:**  
Dagmar Rahn ✉ Hirschfeldstr. 3 ✉ D-59581 Warstein  
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328  
✉ dagmar@rahn76.de

Ni vizitis ŝin kaj survoje Antonio Miguel en Teresina. Ŝi akompanis nin kune kun la ŝoforo al fora vilaĝo de eksaj sklavoj, kiuj vivas ankoraŭ nuntempe en ege primitivaj kondiĉoj. Ŝi zorgas tiun grupon kun registaraj programoj. Kristnaskon ŝi pasigis kun ni en Bona Espero!»

Jen ĉi tie ankoraŭ kelkaj fotoj de niaj infanoj :



*En la nomo de la infanoj mi tre kore dankas ĉiujn amikojn kaj subtenantojn kaj deziras vin gajan paskan feston!*

Bernd Schönberner (ankaŭ magiisto „Don Espero“)  
(prezidanto)

**donacokonto:**  
konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede  
(BLZ / bankkodo 464 510 12)

**kasistino:**  
Dagmar Rahn ✉ Hirschfeldstr. 3 ✉ D-59581 Warstein  
☎ +49-(0)2902-700330, ☎ +49-(0)2902-700328  
✉ dagmar@rahn76.de